

Grandioza Finalo ĉe La Globo

Supozu, ke vi volas fari rezervon por la adiaŭa vivspektaklo ĉe La Globo, kiam la Ekosistema Cirko alvenos al la fino de sia rekorda tutmonda turneo. Tio ne estas entrepreno por la malfortaj koroj. La Globo estas unu el la plej ekskluzivaj scenejoj en la tuta universo. Por mendi vian lokon por atesti propraokule la amasan estingadon, kiu superos ĉiujn amasajn estingojn -- okazaĵon, en kiu formortos almenaŭ 10 milionojn da specioj de kompleksaj plurĉelaj vivoformoj -- vi bezonos vere superhoman persistemon.

Antaŭ ĉio, vi bezonos paciencon. Vi devos atendi tre longe, pli ol ok miliardojn da jaroj post la Praeksplodego. Tio necesos ĉar via plej bona ŝanco vidi la ekstermadon de 10 milionoj da specioj de kompleksaj vivoformoj estas trovi lokon kun pli ol 10 milionoj. Por tio necesos galaksion. Nu, ne mankas tiuj, sed vi bezonos galaksion kun bonkondukta mezpeza stelo lokita en relative trankvila regiono. Ekzistas ankaŭ multaj tiaj, sed tio, kion vi bezonos, postulos, ke bona disĵetaĵo de kosma detrito, kiel karbono, oksigeno, nitrogeno, silicio kaj fero, estu verŝita en rokajn planedojn dum ĝi formiĝis. Tio postulas atendadon ĝis konstanta provizo de supernovaoj eksplodigos tiajn aĵojn en la kosmon antaŭ ol via stelo naskiĝos. Ni ne forgesu ŝprucadon de radioaktivaj elementoj, ĉar via planedo bezonos agrablan varman kernon, kiu ne malvarmiĝos tro rapide. Tial la longa atendo.

La atendado ne finiĝos tiam. Vi devos trovi planedon, kiu konservas likvan akvon sur sia tersupraĵo dum pluraj miliardoj da jaroj, escepte de du aŭ tri neĝglobaj eraoj, kiam la akvo devas kaŭri sub planede glacia plato. Tio implicas, ke via planedo unue bezonos multan metanon kaj karbonan dioksidon en la atmosfero, dum ĝia juna suno marŝos ĝis plena brilo, aldone, manieron por ĉerpi metanon post ĉirkaŭ miliardo da jaroj, kaj poste ĉerpadi la plej grandan parton de la karbona dioksido dum ankoraŭ proksimume miliardo da jaroj, dum tiu suno varmiĝos.

Antaŭ tiam simpla vivo probable aperos. La vetŝanco kontraŭ tio ne estas ekstrema. Sed vi ankoraŭ devos kontroli grandegan nombron da mondoj, aŭ havi multegan bonsorton, por trovi planedon, kie ekestas kompleksaj organismoj; kaj vi bezonos abundan paciencon, ĉar eĉ kun tiom da bonŝanco pasos preskaŭ kvar miliardoj da jaroj. Dum tiu tempo via planedo povus suferi plurajn gravajn frapojn de asteroidoj, sed ne planedamasan kolizion.

Eĉ se via planedo atingos tiun staton sen ruinigo, ekzistos nenia garantio, ke ekestos konsciaj estaĵoj, kiuj scias regi fajron, konstrui radojn, elpensi skribon, fabriki armilojn kaj kompreneble ekhavi la ideon de starigi akciajn korporaciojn. Por trovi planedon kun tiaj estaĵoj, vi bezonos alian eksterordinaran tranĉaĵon de sorto, aŭ sukcesigi nekredeble malfacilan serĉadon. Sed se vi hazarde trovos tiel bizaregan planedon, via atendado estos preskaŭ finita.

La sola kondiĉo, kiu tiam devos esti plenumita, estas, ke ekzistu multaj da tiuj kreitaĵoj, miliardoj da ili -- homoj kiel ni, alivorte, kiuj opinias, ke kontraŭula partia sistemo estas admirinda formo de registaro, kaj kiuj lasas siajn estrojn konvinki ilin, ke korporacioj havas neforpreneblan devon ĉasi profiton antaŭ ĉio. Tiam finfine, en nuraj jardekoj, vi povos spekti la ekstermadon de 10 milionoj da multĉelaj specioj (pli-malpli) inkluzive de ni.

[Richard Forsyth, Januaro 2020.]